



ANARKIO

INFORMA MONATA
BULTENO
DECEMBRO 2011
Nº 16

Ni ne estas komercaĵoj, ni estas homaro kaj ni ne havas prezo!

Nia lukto estas per konstrui novaj rilatoj sen premegon kaj sen ekspluatadon, Tio ne estas malplenaj vortoj, sed veraj kaj realaj fundamentoj por rekta anarkiista ago.

Rompi kapitalista sistemo estas urĝa, ĉar nia popolo suferas kun mizero kaj degrado ke oni rezultas de malegalaj rilatoj kie kelkaj gajnas multe dum aliaj havas nenio por ĝia vivo.

Ekstrema maljusteco devas esti destruema kaj tio oni estas de nia popolo mem.

Ni ne kredas ke dekstra kaj maldekstra partioj, religioj, Ŝtatoj faros socia revolucio en nia mondo kaj nek ĝi faros ia afero en tio direkto. Ĉiam okazas intersanĝo povo kie tiuj estis per baso prenas povo kiel nova tirano.

Ni evitas tion ĉar ni proponas aboleco de socia klaso kaj kie ni formas autoadministrata organizacio sen partioj, sen religioj, sen Ŝtato.

Nia lukto estas en tio senco.

Ni estas anarkiistaj ĉar ni ne estas sklavoj kaj nek ni estas ekspluatantoj sed ni volas tre libereco, tre justeco, tre egaleco al ĉiuj.



Manifesto de la Sennaciistoj

— Ne nur legu, sed studu.

Jam de dek jaroj la sennaciismo fantomas en la vicoj de l' laborista esperanta movado. Tra la tuta mondo miloj da proletoj uzas inter si la saman lingvon, ĉu en grupoj, ĉu por sia korespondado kun aliaj k-doĵ el malproksimaj lokoj. Tiu fakto naskigis la ideon pri eblo por la Laboristaro sin organizi laŭ originala maniero k prezenti al si novajn metodojn de klasbatalo.

Ĝis nun la sennaciismo estis ofte priparolata en la organoj de Sennacieca Asocio Tutmonda k neniam estiĝis tre forta kontraŭstaro al tiu nova ismo. Sed estis antaŭvideble, ke iun tagon la ortodoksaj internaciistoj kontraŭstaros al tia herezaĵo. Efektive, jam de kelka tempo vasta agitado estas metode entreprenita por kontraŭbatali la novan ismon.

Sekve la k-doĵ, kiuj simpatias al la ideo, sed ne havas pri ĝi tre klaran bildon, povus ŝanceliĝi. Multaj senpripense eĉ identigis la sennaciismon kun la «proleta internaciismo». Tial estas nepre necese prezenti klare k sufiĉe detale nian vidpunkton k defendi ĝin kontraŭ la atakoj de la ortodoksuloj.

Tio fariĝis tiom pli necesa, ke se ni ne vigle kontraŭmetos niajn argumentojn al la sofismoj k ŝablonoj disvastigitaj de la internaciistoj, ĉi lastaj sukcesos en la konfuzo kredigi al la esperantistaro, ke ili reprezentas la sole revolucion tendencon. Dum estas

facile montri, ke ilia internaciismo estas fakte nur ia oportunismo, akceptebla ĉe partigvidantoj, ignorantaj la lingvan problemon, sed nepardonebla ĉe proletaj esperantistoj.

Ni estas certaj, ke plurjara aplikado de esperanto fare de klaskonsciaj laboristoj devas nepre alkonduki ilin unue al embrio de sennacieca spiritostato, k poste al klara prezento de problemoj je sennacieca vidpunkto. Ni ne dubas, ke multaj k-doĵ trovos en la sekvantaj paĝoj la klarigon, la firmigon pri tio, kion ili pli malpli konfuze sentas k prezentas al si jam delonge.

Ili certe konsentos kun ni, ke vera revoluciulo devas esti kapabla ideo anticipi. En mala okazo li estas nur filistre konservativa. Tial la proletaj esperantistoj devas tiri ĉiujn logikajn konsekvencojn el la aplikado de artefarita mondlingvo.

Ni plene konscias, ke nia vidpunkto estas nuntempe utopia, tial ke ĝis nun esperanto tre malvaste disvastiĝis. Sed en la okuloj de multaj, kiuj konsideros la sennaciismon kiel fantaziaĵon, mondlingvo ankaŭ estas de ili konsiderata kiel utopio. Kaj tamen ni, esperantistoj, scias propraspekte, ke ĝi estas efektivegeblaĵo, ke ĝi estas fakto, viva fakto.

Ni do, sentime elpaŝas kun nia Manifesto en la arenon de la ideologia batalo.

Januaro 1931.

(per Lanti)

Tio dauriĝas proksima eldono



15-an de Oktobro - Unuiĝo por Tutmonda Ŝanĝo

Manifesto de la "indignula movado" okaze de tutmonda mobilizado la 15-an de oktobro - 2011.

La 15-an de oktobro, homoj en la tuta mondo ekregos stratojn kaj placojn. De Ameriko ĝis Azio, de Afriko ĝis Eŭropo, homoj ekstaras por depostuli siajn rajtojn kaj peti veran demokration. Jam venas al ni ĉiuj la tempo unuiĝi en tutmondan neperfortan proteston.

La regantaj potencoj laboras cele profiton de iuj malmultaj, ignorante la volon de la granda plimulto kaj malestimante la kostojn homan kaj naturmedian, kiujn ni ĉiuj devas pagi. Necesas ĉesigi ĉi neelteneblan situacion.


Unuoviĝintaj, ni diskonigos al la politikuloj kaj al la financa elito, kiun ili priservas, ke ekde nun ni, la homoj, decidus pri nia estonto. Ni ne estas varoj inter manoj de politikuloj kaj bankistoj, kiuj nin ne reprezentas.

La 15-an de oktobro, ni kuniĝos en la stratoj por ekigi la tutmondan ŝanĝon kiun ni deziras. Ni pace manifestiĝos, debatados kaj organiziĝos ĝis atingi nian celon.

Estas tempo por ni unuiĝi. Estas tempo por ili aŭskulti nin.

Ni ekregu niajn stratojn tra la mondo la 15-an de oktobro!

Esperanto sen Instruisto – Álvaro Pontes Popola Esperanta Metodo



Unua Leciono La alfabeto

1-O alfabeto compõe-se de 28 letras (cinco vogais, duas semi-vogais e vinte e uma consoantes), que tem sempre a mesma pronúncia.

A, B, C, Ĉ, D, E, F, G, Ĝ, H, Ĥ, I, J, Ĵ, L, M, N, O, P, R, S, Ŝ, T, U, Ŭ, V, Z

Vogais

2- Vogais são letras a, e, i, o, u (como em português) que têm um som próprio e podem pronunciar-se sozinhas. O seu valor inalterável á, ê, i, ô, u foi já assinalado no alfabeto.

Semi-vogais

3- Semi-vogais são as letras j e ŭ, cujo som é o das vogais portuguesas i e u, pronunciadas rapidamente, como também se demonstra no alfabeto.

As semi-vogais nunca se pronunciam sozinhas. Ligadas a uma vogal, que lhe dá o som principal, formam uma sílaba muito sonora que se chama ditongo.

Os grupos aj, aŭ, ej, eŭ, oj, uj, já, je, jo, e ju, formam, pois, uma sílaba e são ditongos.

Pronunciai bem numa emissão de voz: aj como em ai; aŭ como em automóvel; ej como ei-la; eŭ como eu; oj como em oitava; uj como fui; já como fiar; je como Viena; jo como iodo; ju como Fiuza.

Consoantes

4- Consoantes são letras que, numa palavra, não dão um som senão ligadas a uma vogal.

O seu respectivo valor, com o das vogais e semi-vogais, está, também, levemente assinalado no alfabeto.

Ni bezonas voluntulojn!

Nia iniciatemo bezonas voluntulojn por skribi, traduki, desegni aŭ por iu ajn kontribuaĵo.
Ĉia helpo estas bonvenan, dankon!
Sanon kaj anarkion!

Kontaktojn

Fenikso Nigra

CP: 999 - CEP 13001-970 Campinas - San-Paŭlio

Aŭ

CP: 5005 - 130036-970 Campinas - San-Paŭlio

m.e.: fenikso@anarkio.net

m.e.: fenikso@riseup.net

<http://anarkio.net>

